


Bulgara ESPERANTISTO





Esperanto-kurso en Trojan. Gvidanto Ivan Lišev



Partoprenantoj en la Volga-Urala E-Renkontiĝo
(vd. paĝon 13) Foto L. Skvorcova

ENHAVO

* * *	Al novaj horizontoj . . .	1
* * *	Prof. ing. V. Peevski. Ad- reso de CK de BEA . . .	2
* * *	Celebro de prof. ing. V. Peevski . . .	3
	Kristina Aleksova. Novjara bon- deziro . . .	4
	Penka Batoeva. Diru al mi . . .	4
	Stefan Sokolov. La malnova kaj nova stacidomoj . . .	5
	Ljubomir Dimitrov. Vespero „Es- peranto en nia vivo“ . . .	6
	Nano Nanov. Krâstju Karucin . .	7
	Georgi Dolapčiev. Ĥristo Kanev .	8
	Proŝo. La jubilea koncerto de Ve- selin Damjanov . . .	9
	Stojčo Cankov. Ruse — nia kon- gresurbo . . .	10
	Mara Staneva. Dilo Jotov Bojnov	11
	Dilara Mamedova. Volga-Urala E- Renkontiĝo . . .	13
* * *	Esperanto-kurso per Brati- slava Televido . . .	14
	Romano Grinŝpan. BAM — kon- struado de la plej granda fer- vojo en la XX jarcento . . .	14
* * *	Letero el Brazilo . . .	15
* * *	Canko Murgin. Okdek jaroj ekde la dua E-lernolibro en Bulgario	15
* * *	Forpasis Haralambi Bâčvarov	16
* * *	Tra la gazetaro . . .	16
	Ljudmila Jevsejeva. Enigmoj. Di- venu . . .	III
	Flori Nikolov. Vortenigmo . . .	III

Sur la kovrilpaĝo:

Vidaĵo el la kongresurbo Ruse: la Mo-
numento de la Libereco (vd. paĝon 10)

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.



AL NOVAJ HORIZONTOJ!

Pasis dudek kvin jaroj depost la historia Kvina Kongreso de la Bulgara Komunista Partio — la unua post la liberigo de nia lando elsub la jugo de la faŝismo. Tiu kongreso sub la gvido de Georgi Dimitrov difinis la vojon al socialisma socio en Bulgario. Dum 15—20 jaroj Bulgario devas fari tion, kion aliaj landoj ĉe aliaj kondiĉoj faris dum tuta jarcento — diris Dimitrov en sia kongresraporto.

Sekvante la vojon montritan de la fama revoluciulo-antifaŝisto, utligante la spertojn kaj ĉiuflankan helpon de Sovetunio, kunlaborante kun la ceteraj frataj popoloj el la socialisma landaro, nia popolo laboris entuziasme, kaj rezulte Bulgario fariĝis evoluinta lando kun moderna industrio kaj kolektivigita vilaĝmastrumo. Forte altiĝis la kultura nivelo de la popolamasoj en nia juna Respubliko.

Nun nia preskaŭ dumiliona laborista klaso, mastro de la industriaj gigantoj, uzinoj kaj elektrocentraloj, laboras por inde renkonti la Dekunuan Kongreson de BKP, kiu malfermos novajn horizontojn antaŭ nia lando. La Sepa Kvinjara Plano, kiun aprobas la kongreso, kreos eblecojn por plia altigo de la salajroj kaj pensioj, kiuj en la periodo de 1960—1974 reale kreskis je 62 procentoj. Ĉirkaŭ 600 000 junaj familioj ricevos novajn apartamentojn ĝis la jaro 1980.

Ĉion, kion entreprenas la Bulgara Komunista Partio, utilas al la laboruloj el urboj kaj vilaĝoj. Jen kial miloj da fabriklaboristoj en la pasintjaraj novembro kaj decembro raportis antaŭ la Centra Komitato de BKP kaj la tuta popolo, ke ili plenumis sian jarplanon antaŭ la difinita tempolimo. Ekzemple la ministoj en la kuprominejo apud Burgas raportis, ke ili elfosis ercon por unu miliono da levoj super la jarplano. La atomenergiaj inĝenieroj kaj teknikistoj en Kozloduj muntis novajn turbinojn okaze de la kongreso. La maŝinkonstruistoj en Ruse — la urbo de nia 39-a nacia E-kongreso — inventis novajn agromaŝinojn.

Similaj raportoj aperadas ĉiutage en la bulgara gazetaro. Tiuj atingoj reale garantias al nia popolo certan supreniron al konstruo de evoluinta socio.

Ni ne dubas, ke ĉiuj bulgaraj esperantistoj plenumos inde sian devon, laborante sindone ankaŭ por realigo de la taskoj, kiujn starigos antaŭ nia lando la XI kongreso de la Bulgara Komunista Partio.

ADRESO DE CK DE BEA

УВАЖАЕМИ И СКЪПИ ДРУГАРЮ ПРОФЕСОР ПЕЕВСКИ!

Всяко обществено или лично чествуване на годишнина е повод за поглед назад в годините, събитията и делата. Навършването на 70 години от рождението Ви, петдесет и пет години от които са тясно свързани с дейността Ви за утвърждаване на международния език есперанто като рационално и полезно средство за пряко общуване между народите, е именно такъв прекрасен повод.

Още като ученик в Плевенската гимназия преди 55 години Вие изучихте есперанто и всеотдайно се включихте в благородното есперантско движение. По-късно Вие като студент, станяхте един от основателите и ръководителите на студентското есперантско дружество в София. Заслужава особено внимание обстоятелството, че и през годините на Вашето следване и специализиране в чужбина, където имахте възможност да овладеете някои от големите национални езици, както и после, като инженер и висш ръководител в Министерството на народната просвета, като професор, декан и ректор на Политехниката и по-късно като дългогодишен ръководител на най-голямата организация на нашата научно-техническа интелигенция — Съюза на научно-техническите съюзи в България, наброяващ повече от 160 000 члена, Вие с дълбоко убеждение за необходимостта от богат, точен и леснодостъпен международен език останяхте верен на есперанто и на есперантското движение.

Във връзка с това заслужава да се отбележи, че преди 15 години Вие станяхте един от основателите на Есперантската секция при Съюза на научните работници в България, на която и досега сте несменно председател, че сте един от ръководителите на Международния съюз на учениците-есперантисти, а сега вече и главен редактор на есперантското издание на сп. «Сциенца мондо» — орган на наброяващата няколкостотин хиляди членове Световна федерация на учениците.

Хвърляйки бегъл поглед върху Вашата дейност, ние не можем да не посочим и участието Ви в международното есперантско движение, с което не само утвърждавате позициите на международния език, но и спомагате за утвърждаване авторитета на нашата наука и Родина. С Вашето участие като ректор и лектор в летните международни есперантски университети Вие показвахте по най-категоричен начин, че есперанто е нужен не само за обикновена кореспонденция и художествена литература, но е напълно годен да предаде точно и най-сложната научна мисъл, да изрази и специално материята от областта на математиката и висшата геодезия. Тази Ваша дейност е пример за това, че проблемът за международния език в обикновения живот и в науката е проблем не само за езиковедството, но и за фмзико-математическите науки.

Вашето активно участие в борбата за утвърждаване на есперанто като международен език е пример и доказателство, че тази борба не е само плод на младежки идеализъм, но е плод и на дълбоко осъзнаване и научнообосновано убеждение, което се изповядва от такива сериозни и заслужили учени като Вас.

CELEBRO DE PROF. INĜ. VASIL PEEVSKI

La 2-an de decembro 1975 la sofia kultura kaj scienca socio celebris brile la 70-jaran jubileon de prof. inĝ. Vasil Peevski — popola aganto de la tekniko, fakulo pri geodezio. La solenaĵo okazis en la tre populara salono de la kulturagantoj.



Raporton pri la vivo kaj riĉa sciencteknika agado de prof. Peevski faris prof. Vladimir Jonĉev. Li pentris antaŭ la multnombra publiko la figuron de la elstara kreanto de la juna socialisma scienco de Bulgario, de la instruinto de multaj generacioj da bulgaraj sciencteknikaj kadroj. Grandvaloran abnegacian agadon disvolvis la jubileulo sur la socia kampo. Multjare li estis prezidanto aŭ estrarano de diversaj sciencaj kaj sociaj organizaĵoj. Aparte

notinda estas lia laboro kiel multjara prezidanto de la Centra Konsilio de la Sciencoteknikaj Asocioj en Bulgario. Delonge prof. inĝ. Peevski estas membro ankaŭ de la estraroj de la Monda Federacio de Inĝenier-Organizaĵoj kaj de la Monda Federacio de Sciencistoj.

Pro la valora kaj reala helpo de prof. Peevski por la bonkonstruado de kelkaj urboj li estas proklamita kiel honora civitano de Sofio, Ruse, Pleven, Târgoviște, Trojan.

La popola registaro honoris lin per la altaj ordenoj «Kiril kaj Metodi» — I grado, kaj «Popola Respubliko Bulgario» — dufoje, per multaj medaloj kaj aliaj distingoj. Li ricevis arkaŭ la altan titolon «popola aganto de la tekniko».

La raportinto prof. Jonĉev aparte menciis la E-agadon de prof. Peevski kiel arda esperantisto. La jubileulo estas unu el la fondintoj de la Esperanto-Sekcio de la Asocio de la Bulgaraj Sciencistoj kaj multjare ĝia prezidanto. Per sciencaj prelegoj li partoprenis la Someran Universitaton dum multaj UK de Esperanto.

Al la jubileulo oni prezentis multege da salutoj, florbukedoj, memordonacoj. Ni menciis nur kelkajn salutojn: el la Ministerioj de la Konstruado kaj Arkitekturo, de la Popola Instruado, de la Mineralaj Fontoj, el la Komitato de Scienco kaj Teknika Progreso, el la Centra Konsilio de la Sindikatoj, el la Tutpopola Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco, el la Supera Instituto de Inĝenieroj-Konstruantoj, el la Supera Kemia-Teknologia Instituto, el la Asocio de la Bulgaraj Geodezistoj, el la ambasadoj de GDR kaj, Pollando, el la Ĉefurba Popola Soveto k.m.a. En la nomo de la Bulgara E-Asocio saluton prezentis la prezidanto Nikola Aleksiev. Kelkaj el la salutantoj, aparte akademiano Kiril Bratanov, parolis pri la riĉa E-agado de prof. Peevski, kiu praktike kaj utile uzas Esperanton sur la scienca kampo.

(Sekvas sur p. 4)

Изразявайки чувство на уважение и благодарност към Вас за голямата подкрепа, която давате на есперантското движение у нас и в света, Централният комитет на Българския есперантски съюз от свое име и от името на своите членове Ви пожелава и през идещите десетилетия да работите все със същата бодрост и активност върху благородното поле на науката, да участвувате още дълги години в борбата за тържеството на международния език есперанто, която е борба за разбирателство, сътрудничество и мир между народите.

София, 2 декември 1975 г.

**ЦЕНТРАЛЕН КОМИТЕТ НА
БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ**

Poezio kaj belestro

Kristina Aleksova

NOVJARA BONDEZIRO

En la festa novjara vespero vi min demandas:
— Kiajn bondezirojn vi volas direkti en tiu ĉi festa nokto?
— Kiajn bondezirojn? Kiajn?
Ho, mia kara! Rigardu ĉi tiun novjran ablon!
Jen tia novjara ablo mi estu!
Ĉirkaŭe lumu infaraj okuloj! Ĉirkaŭe brilu vizaĝoj de homoj!
Ĝojo, ĝojo ĉirkaŭe nur estu!
De tiu ĉi ĝojo ankaŭ mi estu kaŭzinto!

Jen — ĉu vi vidas Avon Frosto?
Ĉu vi vidas lian plenan sakon?
Tia Avo Frosto vi estu! Via sako estu plena
de la produktoj de viaj manoj,
de la boneco, de l' amo de via koro.
Por mi tio signifus, ke vi estas sana,
ke vi estas forta, ke vi estas amata.

En tiu ĉi trosta nokto mi imagas la homojn kiel konkurcan birdaron.
Ĝi lugas en la vastaĵo. Ĝi kantas pri eterna paco,
kiu ekestas jam. Ĝi kantas

pri homoj feliĉaj,
pri homoj animriĉaj,
pri venkita malico,
pri tretita envio,
pri forgesita avido.

La kosmonaŭtoj novaĵon transdonu al ĉiuj estaĵoj de l' kosmo,
ke sur la terglobo vivas
la plej pacamantaj estaĵoj — la homoj.
Tiu ĉi revo estas mia bondeziro al miaj kunhomoj.

Penka Batoeva

DIRU AL MI:

Diru al mi, ke vi min amas.
Diru al mi denove „kara“ —
kaj tago mia iĝos klara,
kaj koro mia ree flamos.

Kaj mi forgesos la malhelon,
la vintran froston de l' ĉielo,
malŝlosos mi la koran ĉelon,
kaj ĉie brilos bluaj steloj.

Ho, mi atendas vin sentfine,
ĝis lasta tago, ĝis la morto,
tiel al mi ordonis sorto —
atendi dolĉe kaj sentime.

Diru al mi, ke vi min amas
kaj mi forgesos korribelojn,
kaj mi kolektos ĉiujn stelojn,
kaj frunton vian mi ornamos.

Diru al mi, ke vi min amas,
kaj mi fariĝos bird' kantanta,
kaj iĝos mi river' fluanta,
ĉar mi vin amas, mi vin amas!

La jubileulo dankis emociite al la salutantoj. Oni sciigis, ke li ricevis skribe ankoraŭ multajn salutojn el la lando kaj eksterlando, inter kiuj: de k-do T. Jivkov — unua sekretario de CK de la Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario, de la Inter-

nacia Federacio de Geodeziistoj, de UEA, de la Tutunia Konsilantaro de Scientechnikaj Societoj en USSR, de naciaj organizaĵoj de sciencistoj, inĝenieroj kaj teknikistoj en Pollando, GDR, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Rumanio, Greklando k. a., de multaj sciencistoj, profesoroj ktp.



LA MALNOVA KAJ NOVA STACIDOMOJ

La estonta idaro rigardos ĝin nur sur fotoj, sed por mi ĝi estas parto de mia vivo. Ne nur pro tio, ke multe da fojoj mi ekveturis de ĝi al diversaj anguloj de mia bela patrolando kaj unu fojon trans la limo — al la senlima soveta lando.

— Kie vi loĝas?

Indikante la straton kaj la numeron de la domo, mi ordinare aldonas:

— Proksime de la stacidomo.

La kara malnova stacidomo! Al ĝia granda okulo — la horloĝo — estis direktataj la rigardoj de la rapidantaj vojaĝantoj. La ŝprucfontano sur ĝia placo estis kutima loko por rendevuoj de la turistoj. Kaj tiuj, kiuj devis pli longe atendi la vagonaron, ĉe varma vetero sidis sur la benkoj sub la grandaj platanoj en la ĝardeno trans la tiama tramlinio, ĉar la atendejo estis malvasta, sufoka, ne bone lumigita.

Povra malnova stacidomo! Kun kiom da insultoj oni surŝutis vin lastatempe! La loĝantaro de nia ĉefurbo triobligiĝis. La urbocentro kun la novaj monumentaj konstruaĵoj nun estas nereconebla. En la periferio kiel sveltaj blankaj grandeguloj viciĝas centoj da multetaĝaj loĝblokoj de la novaj kvartaloj. Kaj kiam oni ekparolas pri la stacidomo, preskaŭ ĉiam oni diras: „Ne decas! Honto por Sofio! Tio ne plu estas stacidomo por ĝi!“. Tamen oni konstruis ĝin por Sofio, por la iama malgranda ĉefurbo. Ŝatata kaj amata, ĝi travivis multajn pacajn jarojn. Poste komencigis la militoj, kaj milojn da soldatoj oni adiaŭis kun larmoj kaj floroj sur ĝia kajo. La samaj soldatoj post longa tempo revenadis malsataj, nudpiedaj, ĉifone vestitaj. Bonvenigitaj de neniuj ĉe la stacidomo, ili vidis en ĝi deziratan rifugejon. Ĝi estis atestan-

to de la granda fervojista striko en 1919—1920. Ne detruis ĝin la bomboj de la anglaj kaj usonaj aviadiloj dum la Dua Mondmilito.

Kun tiuj pensoj mi transdonadis brikojn al la apud mi staranta grandaĝa kalva viro. Siaflanke li transdonis ilin al alia. Tiel la brikoj iris de mano al mano por atingi la grandan fosajon sur la stacidoma placo. Tie ni amasigis ilin por la morgaŭa laboro de la masonistoj.

La aŭgusta suno malsupreniris sur la nebŭlita firmamento. Forpasis unu varmega tago. Facila vento ekblovitis, sed ĝi ne povis forpeli la sufokon de la somera antaŭvespero. Du el niaj kamaradoj iris kaj alportis botelojn da limonado por ĉiuj. Iuj volis pagi, sed oni respondis al ili ŝerce:

— Pagas la dua organizaĵo de la deka sekcio de Oteĉestven Front (Patrolanda Fronto).

Ni dankis kaj ĝuis la refreŝigon de la malvarma trinkaĵo. Vere, ni estis brigadanoj, membroj de la Patrolanda Fronto, venintaj por helpi libervole dum kelke da horoj la konstruantojn de la nova stacidomo. Ĝi jam staris antaŭ ni monumenta, arĝentobрила, marmora kaj vitra. Sed esis necesa ankoraŭ multe da streĉa laboro. Ĝis la fiksita limdato restis malmulte da tempo. La nova stacidomo devis esti solene inaŭgurita tri tagojn antaŭ la trideka datreveno de nia socialisma revolucio. Grandega ruĝa rubando estis fiksita en la centro de ĝia fasado. Brilis orkolora slogano: „1974 — jubilea, avanĝarda!“.

Fininte la laboron, mi ne revenis hejmen, sed komencis vagi kun sambrigadano ĉirkaŭ la konstruaĵo.

— Nun ni estos raportistoj, — mi diris ŝerce al mia kuniranto.

Li estis brunhaŭta sesdekjarulo kun flava pajla ĉapelo. Niaj domoj estis najbaraj.

— Ho, vidu nur!

Mia kamarado levis la manon al impona fera monstro, kiu obee plenumis la ordonon de junulo sidanta en ĝia torso. La junulo nur premis ian turnilon, kaj la monstro levis grandegan kaj pezan betonblokon fiksiton per solidaj metalŝnuroj al ĝia ŝtala beko kaj metis ĝin apud alian. Tiuj ĉi betonblokoj formas parton de la estonta vasta placo antaŭ la stacidomo. Ili servas ankaŭ kiel tegmento de giganta duetaĝa subtera aŭtejo, en kiu trovos rifuĝon du mil aŭtoj. Ĉe la okcidenta rando de la placo alia fera monstro plenumas alian taskon. Ĝia longa rostro elverŝas torenton da betonkaĉo en beton-ĉarpentaĵon. Sub tiu ĉi parto de la placo estos larĝa subtera pasejo por la vojaĝantoj. Tiel la placo mem estos libera por la trafiko de la veturiloj.

Tria ŝtala monstro per siaj potencaj makzeloj ĉerpas amason da grundo kaj ĝin verŝas en kamionon. Nur minutojn la ŝoforo atendas, kaj la ŝargita kamino direktiĝas al alia loko, kie la grundo estas necesa. La amasigitan grundon kvara maŝinego ebenigas per sia brilanta ŝildo.

Kion dirus la iama sklavo, konstruanto de antikvaj temploj kaj de la fortikaj mezepokaj kasteloj, se li vidus la turgruojn, la grundmaŝinojn, la buldozojn, la betonpumpilojn?! Li envidus, ke ni vivas en epoko, en kiu 99% de la peza fizika laboro plenumas potencaj maŝinoj, konstruitaj de nia mensĉo, funkciantaj laŭ nia volo. Kiam ni eniris la vastegan kaj altegan halon — ĝis nun mi ne vidis similan en stacidomo — mian atenton allogis viroj en bluaj laborkostumoj, starantaj sur fera armaturo antaŭ la norda muro. Sur porohavaj marmorsimilaj ŝtonplatoj jam reliefigis la fiero leono de

nia nacia blazono. Kaj la majstroj daŭrigis sian artaĵon, fiksan kro- mitajn metalstriojn sur la muron: ambaŭflanke de la leono konturiĝis lokomotivradoj, kaj rektaj linioj, etendiĝantaj en ĉiuj direktoj, simbolis la relojn.

Sur la fervojkajo mi vidis aliajn avantaĝojn de la nova stacidomo. La retparoj troviĝas en profundaj „litoj“ kaj tiamaniere la radoj de la vagonoj restas kaŝitaj, la vojaĝantoj eniras la vagonojn sen supreniri la vagonŝtupojn. Krome la tegmentitaj kajoj protektas ilin kontraŭ bruliganta suno aŭ torenta pluvo. Haltinte ĉe ĉarpentaĵo, de sur kiu laboristoj kovris la larĝan tegmenton de la ĉefa kajo per longaj arĝentogrizaj lamenoj, mi demandis, kiel oni nomas tiun ĉi por mi nekonatan materialon.

— Paneldecke, — respondis unu el la laboristoj, kaj mi komprenis, ke oni importas ĝin de la Germana Demokratia Respubliko.

Mi kliniĝis kaj prenis tranĉaĵeton de tiu ĉi „paneldecke“. Ĝi rememorigos al mi pri tiuj someraj tagoj, dum kiuj vice kun miloj da aliaj konstruantoj mi donis mian brigadan laboron por la konstruado de la nova stacidomo.

VESPERO „ESPERANTO EN NIA VIVO“

Fine de novembro la E-klubo ĉe la Domo de la kulturo kaj E-Societo «Verda Torĉo» — Gabrovo, organizis interesan vesperon je temo «Esperanto en nia vivo», dediĉitan al la veteranoj de Esperanto en Gabrovo — Kostadin Kolev, Metju Metev, Danail Ivanov, Djanko Minĉev. La multjaraj esperantistoj rakontis pri la rolo de Esperanto en ilia persona vivo, pri siaj vojaĝoj tra la mondo pere de la Internacia Lingvo kaj pri siaj renkontiĝoj kun esperantistoj el Sovetunio, Francio, Aŭstrio, Belgio, Nederlando ka. Al la veteranoj oni prezentis florojn kaj donacojn. La vespero finiĝis per muzika programo.

Ljubomir Dimitrov



CELEBRO DE KR. KARUCIN KAJ ĤR. KANEV

La 3-an de decembro 1975 la sofia esperantistaro celebris du siajn jubileulojn — Krâstju Karucin kaj Ĥristo Kanev — lige kun ilia 60-jariĝo. Raporton pri la vivo kaj agado de Karucin faris Nano Nanov kaj pri Kanev — Georgi Dolapčiev.

Reprezentantoj de la sofiaj E-societoj sincere salutis la jubileulojn, enmanigis

al ili florojn kaj memordonacojn. En la nomo de CK de BEA salutis la prezidantot Nokola Aleksiev.

Ambaŭ jubileuloj dankis pro la atento, esprimita al ili, kaj deklaris, ke ili laboros por Esperanto ĝis sia lasta spiro.

Skizojn pri ilia vivo kaj agado ni doans ĉi-sube.

KRÂSTJU KARUCIN



Kamarado Krâstju Dimitrov Petkov (pseŭdonimo Karucin) estas naskita la 22-an de februaro 1915 en v. Pâdarevo, regiono de Nova Zagora, en multinfana familio de eta komunuma oficisto. En 1925 j. la tuta familio translokiĝis en urbon Stara Zagora.

Jam junaĝe Karucin eniras la revolucion laboristan movadon kaj restas fidela al ĝi por ĉiam. En 1931 li kiel gimnaziano partoprenas en la marksismaj-leninismaj rondetoj kaj fariĝas membro de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS). Samtempe li vigle partoprenas la agadon de la abstinula kaj turisma societoj en la lernejo. Karucin gvidas la lernejanan literaturan societon kaj redaktas ĝian presorganon — la revuon «Eĥo», varbas membrojn por RMS, partoprenas publikajn laboristajn kunvenojn kaj demonstraciojn, vizitas vilaĝojn de la distrikto por fari agitadon.

La aktiveco de Karucin tute ne restas nerimarkita de la faŝista polico. Sekva, traserĉoj en lia domo, arestoj, minacoj eksigoj el la gimnazio, estas persekutata ĉiuj liaj gefratoj. Post la eksigo el la gimnazio Karucin abnegacie fordonas sin al la laborista revolucia movado. En marto 1933 li fariĝas membro de la nelegala Bulgara Junkomunista Unuiĝo (Komsomolo). Li gvidas grupon de tiu organizaĵo kaj estas membro de ĝia regiona komitato. Samtempe li partoprenas aktive en la laborista gazetaro kaj en la loka laborista literatura rondo «Ĥristo Smirnenski».

Pro sia revolucia agado Karucin en 1934 estas arestita, juĝita kaj kondamnita je ok jaroj kaj duono da mallibereco. En la sama jaro estas arestitaj kaj kondamnitaj ankaŭ liaj frato kaj fratino.

Elirinte el la malliberejo en 1939 Karucin denove aktive partoprenas la revolucion movadon. Denove sekvas arestoj, torturoj. Preskaŭ la tutan 1943-an li pasigis en la koncentrejo «Krâsto Pole» apud urbo Ksanti — Greklando. De tie li revenas grave malsana kaj restas monatojn en hospitalo. Post la resaniĝo li denove aktivas en la batalo, jam kiel membro de la Distrikta Komitato de la Komunista Partio en Stara Zagora.

Post la glora venkoporta antifaŝista ribelo la 9-an de septembro 1944 k-do Karucin dediĉas sian energion ĉefe al la kultura fronto. Li estas ĵurnalisto en la redakcio de ĵ. «Septembro» en Stara Zagora, kunlaboranto de la Centra Historia Arkivo ĉe CK de BKP, ĵurnalisto en la partia organo «Rabotniĉesko Delo», redaktoro en la eldonejo de BKP. Kaj intertempe, kvankam ofice kaj partio tre okupata, li finas superan lernejon.

Dekojn da jaroj Karucin aktivas kiel publicisto. Menciinda estas tiurilate lia helpo en la eldonado de la 20-voluma verkaro de Dimitr Blagoev kaj de la 14-voluma verkaro de Georgi Dimitrov. Li estas kun-

aŭtoro de la albumo pri Dimitr Blagoev kaj de la granda albumo «Steloj en la jarcentoj» — pri la herooj, pereintaj en la antifaŝista batalo. Sub lia redakto aperis dekoj da libroj pri historio, memuaroj, bibliografio ka.

Krâstju Karucin esperantiĝis en 1932 kiel lernanto en la tiama 6-a klaso de la gimnazio. Kun la helpo de Asen Grigorov, elstara funkciulo de la Laborista E-Asocio (LEA), en la sama jaro en Stara Zagora estas fondita loka sekcio de LEA. Ĝiaj plej elstaraj fondintoj estis Ivan Grudev — sekretario, poste perfide mortigita de la faŝistoj, kaj Krâstju Karucin — kiel estrano. Karucin vaste korespondis kun eksterlandaj klasbatalaj esperantistoj, unualoke kun sovetaj, fondis E-rondetojn inter la laborista junularo kaj la gelernantoj. Li aktive kunlaboris en la revoluciaj periodaĵoj «Mejdunaroden Ezik», «Mejdunaroden Rabsekor» k. a. per raportaĵoj kaj artikoloj. Sur iliaj paĝoj kaj sur la paĝoj de multaj bulgarlingvaj ĵurnaloj li aperigis interesajn leterojn de eksterlandaj esperantistoj, per kiuj li konigis al la bulgaraj esperantistoj kaj laboristaro la vivon kaj batalon de la

laborista klaso eksterlande.

Post la liberigo de nia lando elsub la faŝista jugo Karucin ekagis por restarigo de la E-societo en Stara Zagora, dum kelka tempo li estis ĝia prezidanto.

En 1950 li translokiĝis en Sofion kaj aktivis en la vicoj de la sofiaj esperantistoj.

Dum multaj jaroj li estis kaj estas estrano de BEA, prezidanto de la Sofia DK de BEA ka. Lia ĉefa agadkampo estas la informado, bibliografio kaj libroeldonado. Delonge li preparas bibliografiojn de Botev kaj Vazov en Esperanto, la temojn «Bulgara belliteraturo en Esperanta traduko», «Esperantaj periodaĵoj en Bulgario» ka.

Pro siaj meritoj en la revolucia movado kaj en la konstruado de la socialismo Krâstju Karucin estas honorita per la alta ordeno «Popola Respubliko Bulgario» kaj per multaj aliaj ŝtataj kaj partiaj distingoj.

La abnegacia agado de Karucin per Esperanto por la socialismo, por la paco kaj la internacia amikeco estas ekzemplo por ĉiuj.

HRISTO KANEV



Hristo Kanev naskiĝis en 1915 en v. Lovĉ, distrikto de Stara Zagora, en mezbienula familio.

En la periodo de 1929—1932 li lernas en la gimnazio en Stara Zagora. Jam en 1929 li aktive partoprenas en la marksismaj-leninismaj grupoj. En tiu periodo li ankaŭ komencas lerni Esperanton en kurso,

organizita de la Laborista E-Asocio (LEA), fariĝas membro de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS), aktivis ankaŭ en la steno-grafa societo.

Pro sia revolucia agado li estas eksigita el la gimnazio por ĉiam, arestita ĉe surstrata manifestacio kaj kruele turmentita en la polico.

Komenciĝas la labora vivo de Kanev — unu jaron en la gepatra mastrumo en la vilaĝo, poste — kiel oficisto en la loka kooperativo. Kaj ĉiam en tiu periodo li okupiĝas per aktiva revolucia laboro, partoprenas en partiaj, komsomolaj kaj esperantistaj regionaj kaj distriktaj konferencoj. Li estas sekretario de la Regiona Komitato de Komsomolo en vilaĝo Kalojanovec kaj membro de la Regiona Komitato de la Bulgara Komunista Partio. En tiu tempo li realigas organizajn kontaktojn inter DK de BKP en Stara Zagora kaj la sofiaj partiaj organoj, helpas malsanajn revoluciulojn, transportas nelaŭleĝan literaturon, instrukciojn kaj materialojn, donitajn al li de CK de BKP.

Samtempe Kanev gvidas kurson de Esperanto kaj organizas societon de LEA.

Pro sia agado li estas ĵetita en malliberejon, kondamnita je tri jaroj.

En 1938 Kanev estas laborsoldato. En



la kazerno li disvolvas aktivan revolucionan agadon.

Komenciĝas la periodo de la nova — Dua Mondmilito. Denove senĉesa agado por plenumo de partiaj taskoj, kolektado kaj interŝanĝo de armiloj; sukcesaj aktivecoj konekse kun la bone memorata de ni «Sobolev-akcio» en 1940 ktp. Kelkfoje arestita en 1941 Kanev estas loĝigita fare de la polico en la regiono de Ĥarmanli. Post tio — reveno en la naskiĝvilagon, kiun li sukcesas kaŝe forlasi kaj forveturi al la Egea Maro. Du jarojn li restas tie helpante diversmaniere partizanojn kaj partizanfamiliojn. En aŭgusto — decembro 1943 Kanev estas en la koncentrejo Demir Ĥisar kaj de majo 1944 — en koncentrejo apud Stara Zagora. Tie la 8-an de septembro lin trafis la libero.

Ekstas nova vivo en nia patrolando ankaŭ por Kanev. Li dediĉas grandan energion kaj spertojn al la socialisma konstruado.

Samtempe li studas foreste kaj sukcesas fini la gimnazion, poste la Sofian Universitaton, kie li diplomiĝis pri juro. Sekvis laboro en la redakcioj de ĵurnaloj «Zemедельско Zname» kaj «Naroden Sport», poste en la eldonejo de la Bulgara Akademio de Sciencoj, kie li emeritiĝis kiel ĉefredaktoro.

Dum sia tuta vivo Ĥristo Kanev estis fidela, sindona kaj tre laborema esperantisto. Ĉe la faŝismo kaj kapitalismo li multe korespondis kun esperantistoj el USSR, Germanio, Ĉinio, Francio, Alĝerio k. a. Multon el sia riĉa korespondaĵo li publikigis tiutempe en la klasbatalaj periodaĵoj de LEA, unualoke en la ĵurnalo «Mejdunaroden Rabselkor». Li gvidis E-kursojn, ĉiam morale kaj materiale helpis la E-movadon. Longan tempon (kaj ankaŭ nun) li estas prezidanto de la Centra Kontrola Komisiono de Bulgara E-Asocio.

Georgi Dolapčev

LA JUBILEA KONCERTO DE VESELIN DAMJANOV

Fine de novembro 1975 en la koncertejo por ĉambromuziko «Bulgaria» okazis la jubilea koncerto de Veselin Damjanov lige kun lia 50-jariĝo kaj multjara muzikagado.

Interesa estas la krea vojo de tiu vaste konata kantmajstro kaj favorulo de la sofia muzikema publiko. Li naskiĝis en urbo Sviŝtov en 1925. En 1945 ekstudis francan filologion en la Sofia universitato «Kliment Ťhrisdski». Tiutempe li komencis partopreni la studentajn amuzvesperojn kiel aktiva amatoro-kantisto kaj baldaŭ registris sin majstro-plenumanto de francaj kaj rusaj kantoj. Damjanov kantis akompanante sin mem per negranda akordiono. Lia velurmola kaj varma baritono kaj lia sincera plenumo vekis furoron en la ardaj koroj de la studenta junularo. Oni ovaciis lin senbride. Granda estas lia kontribuo por popularigo de multaj rusaj kaj francaj kantoj.

Damjanov diplomiĝis kiel filologo, sed tiu kampo ne estis sufiĉa por li. Li finis ankaŭ la Ŝtatan Konservatorion en la klaso de prof. Georgi Zlatev-Ĉerkin.

En daŭro de sep jaroj Damjanov estis solisto en la Armea Ensemblo kaj gajnis laŭreatpremiojn dum muzikfestivaloj en Budapeŝto, Berlino, Bukureŝto.

En 1955 Damjanov fariĝis aktoro en la Ŝtata Muzikteatro «Stefan Makedonski». La teatra publiko estis forte impresita de lia altnivela aktora ludo, de lia agrabla, majstre regata voĉo, de lia senriproĉa muzika interpretado. Li kreas belegajn teatrajn portretojn, kelkaj el kiuj havas etalonan valoron.

Paralele kun tio Damjanov daŭrigis sian koncertan aktivecon. Li kantis ankaŭ en



la Ŝtata Opero de Lion (Francio), kie li partoprenis en la operoj «Don Juan», «Madame Butterfly», «Rigoletto», «Karmen», «Otello». Sukcese li gastis en USSR, GDR, GFR,

Jugoslavio, Francio, Rumanio, Aŭstrio, Ĉinio, Koreo, Hungario, Danlando, Ĉeĥoslovakio, Greklando ka.

Krom sia laboro en la Muzikteatro nun Damjanov lektoras pri kantado en la estrada fako de la Bulgara Koncerta Direkcio.

Li estas ordenita per «Kiril kaj Metodi» I-a grado.

La esperantista mondo konas lin ekde lia partopreno en la programoj de la universalaj kongresoj en Hamburgo kaj Kopenhago. Li estas arda adepto de la E-movado kaj bone regas la Internacian Lingvon.

La jubilea koncerto de Veselin Damjanov estis brila festo de la bulgara muzikarto. Nia kantisto demonstris altnivelan majstrecon ĉe la plenumo de diversaj muzkpecoj.

La kulmino de la unua koncerta parto estis «Mefisto» kaj «La pulo» de Musorgski.

Veselin Damjanov havas altan prilivingan kulturon. Konante bone francan kaj

aliajn lingvojn de la romana lingva grupo, same la rusan lingvon, li kapablas prezenti perfekte la tekstojn de la kantoj. Lia senriproĉa elparolo ankaŭ ebligas rektan kaj senkondiĉan efikon al la publiko. La vokalistiko ĉe li ne estas memcela. Ĝi estas rimedo por saturi la tekston per melodio.

Dum la jubilea koncerto oni vidis varian Veselin Damjanov, kiu majstre plenumas ankaŭ diverspopolajn kantojn.

La publiko donis sinceran esprimon de sia aprobo. Ĝi ovaciis lin malavare kaj la koncerta podio estis surŝutita de florbukedoj.

La esperantistoj atendas memstaran koncerton de V. Damjanov el Esperantaj kaj esperantigitaj kantoj. Ni bondeziras al la jubileulo multajn similajn koncertojn en nia lando kaj translandlime. Bonŝancon, kara samideano Veselin Damjanov!

Proŝo

RUSE — ULA KONGRESURBO

Ruse rajte estas konsiderata kiel unu el la plej ĉarmaj urboj ĉe Danubo laŭ ties longa vojo de Svarcvald ĝis la Nigra Maro. Ĝi havas 160 350 loĝantojn kaj laŭ grandeco estas la kvara urbo en Popola Respubliko Bulgario.

La loĝloko aperis komence de la nova epoko kiel milita fortikaĵo kaj haveno de la romia danuba floto, nomita Seksaginta Prista (Haveno de 60 ŝipoj). En la unua bulgara ŝtato 25 km-n sude de Prista aperis la urbo Ĉerven, detruita ĉe la invado de la turkoj. Poste apud la antikva Prista elkreskis urbo kun la nomo Rusi aŭ Rusĉuk. Dum la dua duono de la XIX-a jarcento Rusĉuk estiĝis centro de la tuta danuba regiono de Niŝ, Sofio kaj Vidin ĝis Tulĉa. Ekde 1864 administranto de la regiono (vilaeto) estis Mithat Paŝao. Li bonkonstruis kaj modernigis la urbon. Plifortiĝis ankaŭ ĝia komerca signifo. Post la liberiĝo de Bulgario el la osmana jugo Ruse estis la plej granda urbo en la lando kun multe pli da fabrikoj, bankoj kaj konsulejoj ol la novelektita ĉefurbo Sofio.

Nuntempe Ruse estas grava industria, transporta kaj kultura centro de la lando. Dum 1975 por unu semajno ĝi donis tiom da industria produktaĵo, kiom dum la tuta 1948. La nombro de la uzinoj kaj fabrikoj estas pli ol 60. Inter ili: la uzino por vilaĝmastrumaj maŝinoj, maraj kaj riveraj ŝipoj, elektronkalkula tekniko, metaltranĉaj maŝinoj, elektroinstalaj kaj elektroizolaj pro-

duktaĵoj, tuboj, kotonaj, silkaj kaj kanaba teksvaroj, konfekcio, sukero, fermentilo, tartracido, konservitaj nutraĵoj kma.

Ruse estas unu el la plej gravaj danubaj havenoj. En 1972 ĝi okupis la trian lokon de komuna ŝarĝospezo antaŭante Beogradon, Budapeŝton, Vienon, Bratislavon, Regensburgon ka. En Ruse estas la rezidejo de la bulgara danuba floto. La vojaĝŝipoj subtenas la preterbordan navigadon kaj la turistajn liniojn ĝis Vieno.

Apud Ruse en 1954 oni konstruis la plej grandan danuban ponton, kiu ligas Bulgarijon kaj Rumanion. Ekspresaj vagonaroj ligas Ruse kun Sofio, Varna, Bukureŝto, Budapeŝto, Moskvo, Berlino ka. Kelkaj aviadiloj ĉiutage flugas al Sofio kaj aliaj urboj de Bulgario.

En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo vegetas la vinberujo. Neantaŭitaj estas la specoj bolgar, misket (muskata vinbero), ĉauŝ (eburkolora vinbero), perla, kardinal ka.

Ruse estas urbo kun riĉaj kulturaj tradicioj. Ĝi havas operan, dramon kaj pupan teatrojn, filharmonion, artgalerion. Ĉiujare oni okazigas la internacian festivalon «Martaj Muziktagoj de Ruse», en kiuj partoprenas eminentaj kolektivoj kaj muzikistoj. En Ruse estas Supera Instituto de Mekaniko kaj Elektrecigo de la Vilaĝa Mastrumo, Pedagogia Instituto por Infaninstruistinoj, multaj teknikumoj kaj gimnazioj (matematika, ruslingva, anglalingva, vespera, sporta).

Estas ankaŭ kelkaj muzeoj, kiuj reflektas



la vivon kaj agadon de eminentaj bulgaraj batalantoj kontraŭ la otomana jugo, kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. Memore pri ili estas monumentoj kaj tabuloj. Oni zorgas speciale pri la arkitektura kaj historia heredaĵo de la urbo. Pli ol 120 konstruaĵoj estas deklaritaj kiel konstruaĵoj kun arkitektura valoro. Inter ili estas la konstruaĵo de la malnova teatro en bona kombino kun la Monumento de la Libereco — faro de la itala arkitekto kaj skulptisto Arnoldo Coki. En 1973 en Ruse oni konstruis monumenton de Vladimir Iliĉ Lenin.

Ruse estas ĝemeligita kun la urboj Riga,

Bratislava, Potsdam, Sent Uan kaj subtenas kontaktojn kun Kotovsk (Moldova SSR), la distrikto Ilfov (Rumanio) ka.

La urbo altiras multajn turistojn. Je ĝia dispono estas la dudeketaĝa hotelo «Riga», la originalaj establejoj «Leventa», «La Fiŝista Kabano», «Stranĝata» ka.

En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo troviĝas la bela arbarparko «Lipnik», la restaĵoj de la mezepoka urbo Ĉerven, la interesaj rokaj preĝejoj kun freskoj en la pitoreskaj intermontoj de la rivero Rusenski Lom, la elektrecigita groto «Orlova Ĉuka» (Agla Rokpinto), la rokaj produktoj de fungoj apud la vilaĝo Krasen kma.

Stojĉo Cankov

prezidanto de DK de BEA en Ruse



Dilo Jotov Bojnov naskiĝis en 1905 en v. Toros (nun Lazar Stanevo), distrikto de Loveĉ, kiel sesa infano el ok gefratoj. Pro la peza laboro sur fremdaj agroj kaj pro la granda malriceco liaj gepatroj malsaniĝis kaj frue mortis. La orfo devis batali solaj en la vivo.

Dilo estis unu el la plej kapablaj lernantoj de sia instruisto Lazar Stanev — la famiginta en la postaj sociaj bataloj granda popola defendanto kaj batalanto por unueco de laboristoj kaj vilaĝanoj, de komunistoj kaj agraristoj kontraŭ la faŝisma diktaturo. Sed pro la malriĉeco Dilo ne povis studi en mezlernejo kaj restis kun fundamenta instruisteco.

Kiel junulo li laboris en la magazeno de riĉa komercisto en Ĉerven Brjag, poste kiel konstrulaboristo.

Instruita de sia propra vivo, de siaj progresmaj fratoj Bojko kaj Rajko, de sia flama instruisto-komunisto Lazar Stanev, Dilo frue ekiris la vojon de revoluciulo. Li multe legis marksisman literaturon, vizitadis la klubejon de la Komunista Partio, aktive partoprenis la vivon de la junkomunista organizaĵo.

DILO JOTOV BOJNOV

Lige kun la 70-a datreveno ekde lia naskiĝo

Kiel soldato en Vraca (1925—26) pro revolucia agado la milittribunalo kondamnis lin je mallibereco. En la malliberejo li havigis al si lernolibron de Esperanto, dum mallonga tempo bone ellernis la lingvon kaj elirinte je libero komencis aktive korespondi kun eksterlandaj esperantistoj, unualoke sovetaj kaj ĉinaj.

Dilo fariĝis forĝisto kaj laboris kun sia amiko Dimitro Todorov, same progresema kaj tre sciama junulo kaj entuziasma esperantisto. Ili ambaŭ estis tre aktivaj propagandantoj de la Internacia Lingvo. Ĝia laborejo fariĝis fajrujo de aktiva politika kaj kultura vivo. En ĝi renkontiĝadis multaj junaj laboristoj. Surbaze de ricevitaj leteroj Dilo informadis ilin pri la bataloj de la laboristoj en eksterlando. Pro sia neordinara modesteco, honesteco, vigla intelekto kaj erudicio li fariĝis ŝatata gasto de laborvesperoj kaj kamaradaj renkontiĝoj kaj kunvenoj, estimata kunparolanto.

En Toros en 1930 oni fondis RMS¹-societon. Dilo estis unuanime elektita kiel ĝia sekretario. Li membris

¹ RMS-junkomunista organizo.

ankaŭ en la Laborista Partio. Je la 1 de aŭgusto 1930 li partoprenis en kontraŭmilita manifestacio. Sur la vilaĝa sonorilego li fiksis ruĝan flagon kun la surskribo „For la kontraŭsovetan militon!“. La flago flirtis libere kelkajn horojn kaj vekis entuziasmon kaj ĝojon ĉe la laborvilaĝanoj, koleregon kaj venĝeman malamon ĉe la reakciuloj kaj la polico.



Sekvis aliaj revoluciaj manifestacioj — kaj novaj persekutoj kaj arestoj. En januaro 1931 Dilo estis arestita kune kun multaj aliaj junaj komunistoj kaj kruele inkviziciita en la policejo. Kun Dilo ni estis kondamnitaj je unu jaro kaj duono da severa mallibereco.

La malliberejo estiĝis nova lernejo por Dilo. Dank'al la tutpolpola batalo por amnestio post unu jaro li eliris el la malliberejo jam bone hardita batalanto. La laboruloj de Toros renkontis sian amaton kun floroj kaj muziko. Antaŭ la partia klubejo okazis impona mitingo, en

kiu Dilo name parolis.

Ekbolis kun pli granda impeto la junkomunista vivo en la vilaĝo. Ni organizis laborvesperojn, fondis virinajn kaj infanajn komunistajn grupojn, kanthoron. Dilo montriĝis vera amasaganto, inda kaj fidela lerninto de sia instruisto Lazar Ŝtanev. Tiu lasta ofte venis en la vilaĝon, helpis. la agadon de la Laborista Partio kaj RMS

En tiu tempo Dilo organizis kurson de Esperanto, vizitata de pli ol 20 gejunuloj. Li sola gvidis la tutan kursan laboron.

Frumatene de la 1 de majo 1932 Dilo kaj mia frato Nejko preparis ruĝajn rubandojn kun stampita sur ili slogano „Vivu la 1-a de majo!“ Post tio dum du horoj la aktivuloj-remsanoj ornamis la brustojn de ĉiuj vilaĝanoj per ruĝaj rubandoj. Tiu ĉi tago estis ankaŭ Pasko kaj la tuta vilaĝanaro estis surstrate. Tagmeze je la rando de la vilaĝo kolektiĝis multaj junuloj. Mi kaj Dilo ĉirkaŭiris ĉiujn kaj ornamis ankaŭ ilin per ruĝaj rubandoj. Ekludis muziko kaj ĉiuj junuloj direktiĝis al la rondodanco. Dilo iris antaŭe. En la malproksimo aperis du policianoj kaj la vilaĝestro. Proksimiĝinte unu el la policianoj ordonis al Dilo demeti la ruĝan rubandon. Li respondis, ke li ne kroĉis ĝin por ĝin demeti. Tiam la vilaĝestro komandis kaj la policano pafis en la kapon de Dilo. Dilo falis teren. La sekva pafo estis kontraŭ mi, sed ne trafis min. Riskante la vivon mi proksimiĝis rapide al Dilo kaj purigis lian vizaĝon de sango. „Se vi ankoraŭ astas viva, premu mian manon!“ — kriis mi. Li faris provon ĝin premi, poste levis kaj metis ĝin sur la unuamajan rubandon, kroĉitan surbruste per lia esperantista insigno.

La policianoj sin ĵetis al mi kaj forpuŝis min per siaj kolboj. La sango de Dilo daŭre elfluis.

Alvenis la regiona estro kun policianoj kaj la vilaĝo estis blokita.

Venis ankaŭ soldatoj. La vilaĝo estis terurigita. La tuta partia kaj RMS-aktivularo estis arestita kaj forveturigita al Pleven en la distriktan policejon, kie oni kruele nin torturis. Apenaŭ ĉe sunsubiro oni prenis Dilon de la loko, kien li falis, kaj veturigis lin al Pleven. Tie li mortis en la ĉambro por arestitoj ĉe la hospitalo.

Tiel finis sian junan vivon la fidela popola filo Dilo Jotov — aktiva kaj sentima junkomunisto, entuziasma esperantisto, amato de la laborjunularo en nia batalspira vilaĝo.

En Sofio Lazar Stanev verkis nekrologon, pro kiu la polico organizis proceson kontraŭ lin. Stanev faris enketon kun eminentaj sociagantoj el Sofio sur la pereoloko de Dilo kaj pruvis, ke la mortigo estis anticipe

organizita. Li kiel deputito, arkaŭdufoje demandis en la Parlamento kaj malkovris la veron pri la mortigo de Dilo. La tuta demokratia socio en nia lando esprimis indignon kontraŭ la murdintoj, kontraŭ la reakcia politika reĝimo kaj sistemo.

CK de la bulgara Laborista Esperanto-Asocio, kies membro estis Dilo Jotov, aperigis proteston, subskribitan de ĝia sekretario Nikola Aleksiev, kiu estis publikita en j. „Rabotniĉesko Delo“ (11 de majo). En la protesto oni diras: „Antaŭ la kara viktimo ni, liaj kamaradoj, organizitaj en la Laborista Esperanto-Asocio, deklaras, ke ni daŭrigos ankoraŭ pli obstine la batalon kontraŭ la teroro de la faŝisma diktaturo, por ĝia fiaskigo kaj por regpotenco de la laboristoj kaj kamparanoj“.

Mara STANEVA

Aldono de la Redakcio. En v. Lazar Stanevo okazis celebrego lige kun la 70-jara datreveno ekde la naskiĝo de Dilo Jotov. Ĉeestis la tuta loĝantaro de la vilaĝo kaj multe da homoj el la najbaraj vilaĝoj. Antaŭ la monumenton de Dilo oni prezentis florkronojn. En la kulturdomo okazis celebra kunveno kun raporto pri la vivo kaj batalo de tiu neforgesebla popola heroo. Poste oni inaŭguris la novan junularan domon „Dilo Jotov“, en kiu la komsomolanoj disvolvos sian politikan kaj kulturen vivon, sankte gardante la testamenton de sia patrono.

TRA LA E★ MONDO

VOLGA-URALA E-RENKONTIĜO

Dum la festo de la Granda Oktobra Revolucio okazis la tradicia (jam la VII-a) Volga-Urala E-Renkontiĝo. 80 samideanoj el 26 urboj venis al Ufa, kie nun troviĝas la plej agema kaj forta esperantista klubo en USSR. Post la malfermo de la renkontiĝo fare de Boris Kolker sekvis salutparoladoj de klubaj reprezentantoj kaj unuopaj esperantistoj.

Dum la konferenco, organizita enkadre de la renkontiĝo, estis ĉiufanke pridiskutita la agado de la soveta esperantistoj renkonte al la XXV-a kongreso de KPSU. La uralaj esperantistoj esprimis sian pretecon traduki en Esperanton materialojn kaj la konkludojn de la kongreso. Ĉiuj

kluboj subtenis la ideon pri organizo de ekspozicioj dediĉe al la prepariĝo de la soveta popolo por tiu ĉi granda evento.

La dommastroj afable montris al la partoprenintoj la rimarkindaĵojn de sia bela urbo. Ili organizis konatiĝon kun interesaj samurbanoj, inter kiuj ankaŭ inĝeniero J. Nelkenbaum, kiu rakontis pri sia lernado de Esperanto en Varsovio antaŭ 48 jaroj sub la gvido de Lidija Zamenhof — filino de Ludoviko Zamenhof.

Fine oni decidis, ke la sekva Volga-Urala E-Renkontiĝo okazu en urbo Tjumen.

Dilara Mametova, Tjumen, USSR



ESPERANTO-KURSO PER BRATISLAVA TELEVIDO

La Slovaka Televido en Bratislava komencis elsendi ekde la 13-a de oktobro 1975 kurson de Esperanto. Tio estas la dua tiaspeca televidelsendo post la nederlanda. Ĝi aperas en la dua programo je la 21,25 horo merkrede. Aŭtoro de la kurso estas Pavel Rosa — profesia ĵurnalisto, prezidanto de la Asocio de Esperantistoj en la Slovaka Socialisma Respubliko.

La kurso konsistas el 17 duonhoraj lecionoj sur 35 milimetra bendo kaj estas internacie uzebila. De arta kaj teknika vidpunktoj ĝi estas altnivela. Ludas en ĝi profesiaj aktoroj.

La kurso vekis grandan intereson. Al la televido venas multe da leteroj kun insistado pri ĝia ripeto.

Laŭ „Starto“, 5/1975

Nova donaco al la fondaĵo Azio-Afriko de UEA

Post la brilaj ekzemploj de la okcident-germana kaj de la brita landaj asocioj tria landa asocio sekvas.

Temas pri la Svisa E-Societo, kiu decidis helpi la agadon de UEA por disvastigo de Esperanto en ekstereŭropaj landoj. Ĝi donacis 300 svisajn frankojn kaj disponigis preseblecojn por aperigi ekzemple informilon destinitan al afrikaj landoj kaj nun tradukatan en afrikaj lingvoj.

BAM — KONSTRUADO DE LA PLEJ GRANDA FERVOJO EN LA XX JARCENTO

Vi certe scias el la geografio, ke en la norda parto de la azia kontinento etendiĝas grandega lando — Siberio. En nuna tempo oni tie konstruas tre longan fervo-

jon, kiu komenciĝas de urbo Ust-Kuto, nordokcidente de la siberia lago Bajkalo, kaj finiĝos apud urbo Komsomolsk ĉe Amuro. Pro tiuj du finaj punktoj la fervojo ricevis la nomon BAM, kiu estas mallongigo de Bajkala-Amura Magistralo (Magistralo en rusa lingvo signifas: ĉefa vojo, ĉefa linio en iu reto, sistemo). Ĝi estos longa 3144 km-n. La konstruantoj de BAM renkontos grandajn malfacilaĵojn, ĉar ĝi pasos tra arbaregoj, montoj, marĉoj kaj parte tra eterne glaciigintaj grundoj. Vintre sur la terenoj de BAM oni devas labori ĉe akra frosto (ĝis 50 gradoj sub la nulo). Estas instalotaj 3200 inĝenieraj konstruaĵoj, inkluzive 200 grandaj pontoj kaj 5 tuneloj, inter kiuj la plej granda, Severo-Mujskij, havos longon de 15 kilometroj. En la tajgo estas trahakotaj 3000 hektaroj da arbaraj strategoj.

Krom la indikita granda BAM oni konstruas meridianan «malgrandan» BAM, de Bajkalo en Jakution, kiu estonte atingos la bordon de la Glacia Norda Oceano. La grandan «BAM-on» oni pliongigos ĝis Pacifiko, mallongigante la ĝisnunan vojon je 600 kilometroj.

En la regionoj de la konstruataj kaj konstruotaj fervojoj troviĝas kolosaj riĉaĵoj: senlima tajgo kun milionaj kubo da ligno, gigantaj kvantoj da karbo, kupro, nafto, natura gaso, koloraj kaj fera ercoj, asbesto kaj aliaj minaĵoj. BAM ebligos ekonomian ekspluaton de la tuta grandega teritorio, kiu ĝin ĉirkaŭas en la lokoj antaŭe mastrataj de ursoj. Aperos kaj disfloros en la maljuna tajgo 45 junaj urboj.

La soveta Komsomolo deklaris sian patronon super la giganta konstruado. Miloj da komsomolanoj-volontuloj entuziasme laboras sur BAM, kiun oni planas plene inaŭguri jam en 1982 j.

Romano Grinŝpan, Taŝkento, USSR

AL LA ESPERANTO-VETERANOJ

Karaj E-veteranoj en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio kaj aliaj landoj! La sovetaĵ esperantistoj kolektas materialojn pri la temo „La rolo de la Esperanto-korespondado en la 20—30-j jaroj por disvastigo de la vero pri la soveta popolo konstruanta socialismon“. Ni petas ĉiujn el vi, estima-

taj veteranoj, skribi viajn rememorojn pri la temo kaj sendi ilin kune kun aliaj materialoj al adreso: Esperanto-klubo, p. k. 11, BARNAUL-99, 656099, USSR.

Se eblas, aldonu ankaŭ vian foton. Koran antaŭdankon!

Gvidanto de la scienc-teknika fako de SEJM

A. GONĈAROV



Letero el Brazilo

Estimataj samideanoj!

Ĉiam, kiam la prezidanto de Brazilo enoficigas novan rektoron en la Federacia Universitato de Ceará, mi devas skribi al vi.

Esperanto en nia universitato progresas, kaj tion ni dankas al viaj ĉiukvarjaraj helpoj. La rektoro, kiu ĵus finis sian rektorecon, ricevis de la tutmonda esperantistaro pli ol 200 gratulleterojn, tial li akceptis kaj helpis Esperanton dum tiuj kvar pasintaj jaroj.

Ni petas, ke vi skribu al la nova rektoro, d-ro Pedro Teixeira Barroso, gratulante lin kaj samtempe montrante al li la valoron de Esperanto. Esprimu kredon, ke Esperanto ankaŭ estonte estos instruata en la universitato. Certe ankaŭ la nova rektoro komprenos, ke nia lingvo meritas la apogon de gravaj personoj, kia li estas.

Uzu la sekvantan adreson: D-ro Pedro

Teixeira Barroso, Rektora Moŝto de Federacia Universitato de Ceará, Av. da Universidade 2853, 60 000 — Fortaleza — Ceará — Brazilo.

En „Centro Educacional Adventista Pedro II“, Fortaleza, ni sukcesis enmeti Esperanton kiel devigan lernobjekton dum ĉi tiu jaro. Se vi skribas al la direktoro, *prof. Edgar Dalzanes Kettle*, poŝtkesto 341, 60 000 — Fortaleza — Ceará — Brazilo, vi helpas la instruadon de Esperanto ankaŭ tie.

Bonvolu afranki filatele, ĉar la direktoro estas filatelisto. Via,

Paulo Amorim Cardoso,

kuno ordiganto de Esperanto-Kurso en la Federacia Universitato de Ceará

OKDEK JAROJ EKDE LA DUA E-LERNOLIBRO EN BULGARIO

La unua lernolibro de Esperanto por bulgaroj estis eldonita de Miloslav Bogdanov. Unue ĝi aperis en kalendaroj ekde decembro 1889 ĝis januaro 1890 kaj tuj poste libroforme. Tiutempe ĝi ludis gravan pioniran rolon kaj helpis la disvastigon de Esperanto en nia lando.

Jam en 1893 la juna popola instruisto Ĥristo Popov (17. IV. 1865 — 10. V. 1945) el vilaĝo Dolna Orjaĥovica apud Veliko Târnovo pretegis la manuskripton de la dua E-lernolibro por bulgaroj kaj sendis ĝin al d-ro Zamenhof por revizio. Laŭ peto de Popov la redakcio de gazeto „*Esperantisto*“ donis lokon al lia demando „ĉu iu ne volus preni sur sin la eldonon de tiu ĉi verko“.

Neniu eldonisto sin anoncis. Tiam Popov mem organizis la aperigon. En la printempo de 1894 li dissendis al diversaj gazetoj kaj esperantistaj adresoj presitan varbilon kun alvoko, ke oni antaŭpagu je reduktita prezo (per 33%). La redakcio de la bulgarlingva gazeto „*Svjat*“ donis detalan informon pri tiu iniciato kaj anoncis, ke krom la presejo „*Iskra*“ de G. S. Semerĝiev en Gorna Orjaĥovica, ankaŭ ĝi mem akceptas abonojn por la lernolibro de Ĥristo Popov.

La redaktoro de gazeto „*Svjat*“ N. D. Kovaĉev admonis al la legantoj: „Mi kredas, ke la amikoj de tiu tiom brila ideo — interamikiĝo de la popoloj — kiu ornamas la terglobon, ne estos avaraj kaj helpas per abonoj la aperigon de la ĉi-supre menciita lernolibro, kiu estas kompilita de bone informita bulgara es-

perantisto, s-ro Popov¹. La libro aperis en junio 1895. Sur la unua paĝo staris la titolo kaj aliaj donitaĵoj: „*Plena lernolibro de la universala lingvo Esperanto, kun duobla vortaro. Tradukis el la rusa eldono (de d-ro Zamenhof) kaj konsideris la francan eldonon Ĥr. Popov. Presejo „Iskra“ de G. S. Semerĝiev. Gorna Orjaĥovica, 1895*“. La lernolibro havis 141 paĝojn kaj estis elĉerpita en kvar jaroj.

Koncizaj informoj pri la dua E-lernolibro por bulgaroj aperis en la gazetoj „*Misâl*“, „*Bâlgarska sbirka*“, „*Svjat*“ k. a.

La ĉiutaga ĵurnalo „*Mir*“² aperigis longan recenzon de N. D. Kovaĉev. Tio fakte estas bone argumentita artikolo kun multaj konkretaj informoj pri la evoluo de Esperanto en Bulgario kaj en eksterlando. Tie ni legas: „Unu parto de nialanda gazetaro, sen trastudi la sistemon de la Esperanta lingvo, ĝin kromnomis „fantazia“. Kiel ajn estu, tiu lingvo tamen daŭre disvastiĝis preskaŭ en la tuta klera mondo“. Kaj plue: „Nun la Esperanta literaturo fieras pri verkoj de aŭtoroj nuntempaj kaj klasikaj. Antaŭnelonge ni legis la „*Hamleton*“ de Ŝekspiro, tradukita verse en Esperanto ktp. La recenzanto donis tre bonajn referencojn pri la lernolibro de Ĥristo Popov.

Canko MURGIN

¹ „*Svjat*“ (mondo), jk. II, 4 aprilo 1894.

² „*Mir*“, jk. II 214/27. II. 1897, Sofio.

15-an jubilean ekspozicion de E-libroj, revuoj, prospektoj, insignoj, polkostumoj kaj letervesperon okaze de la Semajno de Internacia Amikeco aranĝas AERO „*Geopgi Dimitrov*“, agrikultura teknikumo, 4550-Peŝtera, Bulgario. La esperantistoj el eksterlando estas petataj sendi konvenajn materialojn!





La 20-an de novembro 1975 forpasis en sia 93-a jaraĝo la fervora kaj fidela Esperanto-veterano de Veliko Târnovo Ĥaralambi Bâcvarov, emerita instruisto de matematiko. Li esperantigis jam lernanto. Kiel studento en Sofio Bâcvarov estis unu el la fondintoj de la sofia E-Societo «Aŭroro» en 1902. Tiam li gvidis sian unuan E-kurson.

Dum la periodo 1907—1914 Bâcvarov estis instruisto de matematiko en Kjustendil. Tie li laboris vigle por disvastigo de Esperanto inter la junuloj. Bâcvarov faris multe da tradukaĵoj de bulgaraj verkistoj — Vazov, A. Konstantinov, Elin Pelin, verkis artikolojn por la E-gazetaro.

En 1914 li revenis en sian naskiĝurbon V. Târnovo kaj en daŭro de 25 jaroj li instruis matematikon kaj fizikon en la knaba gimnazio. Tie Bâcvarov gvidis multajn E-kursojn por lernantoj. En 1922 li memstare preparis kaj eldonis Esperanto-bulgaran vortaron.

Ĥaralambi Bâcvarov laboris sindone kaj aktive en E-Societo «Lumo». Li partoprenis en multaj E-kongresoj kiel delegito de V. Târnovo.

En la kongreso de la bulgaraj esperantistoj en 1968 (Varna) BEA honoris lin per ora jubilea insigno.

Ĝis la fino de sia vivo Ĥaralambi Bâcvarov restis sindona kaj fidela esperantisto.

Eternan memoron pril!

ABONU LA NOVAN E-REUVON „SCIENCA MONDO“!

Ĝis nun la revuo „Scienca Mondo“ — organo de la Monda Federacio de sciencistoj, aperadis en rusa, angla, franca kaj germana lingvoj. Ekde 1976 j. ĝi komencos aperi ankaŭ en Esperanto: 4 numeroj jare, ĉiu enhavanta 32 paĝojn, formato 1/8 de 60/90. Abonkotizo: 1 levo, 1 rublo aŭ egalvaloro.

En la revuo oni publikigas sciencajn kaj popular-sciencajn artikolojn, precipe de komuna karaktero, tial ĝi estas interesa ne nur por sciencistoj-esperantistoj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj.

Abono ebla ĝis la fino de marto 1976 ĉe ĉiu poŝta filio.

TRA LA GAZETARO

J. „*Studentska Tribuna*“ — Sofia (7. X): informo pri la internacia esperantista laborbrigado en v. Râjevo Konare de Lasto Nikov.

J. „*Septemvrijsko Zname*“ — Pazarĝik (7. X): „50-jara jubileo“ — informo pri la solenaĵo lige kun la 50-jara jubileo de E-Societo „Stoju Kalpazanov“ en Velingrad.

J. „*Sviloza*“ — ĵurnalo de uzino „Sviloza“ en u. Sviŝtov — (7. IX): informo de Angel Angelov: „Esperanto en la turismo — nova formo de kunlaboro“.

J. „*Karlovskaja Tribuna*“ — u. Karlovo (24. X): informo kaj foto pri la solena malfermo de la nova lernejo en la urbo — de M. Sjubrjudekova.

J. „*Ustrem*“ — u. Svoge (15. IV): „Kurso de Esperanto“ — informo de Elena Radenkova.

J. „*Krajgranična Iskra*“ — u. Boljarovo (30. IV): materialoj en rubriko „Esperanto“.

En la sama ĵurnalo:

15. V: Letero de soveta esperantistino Vera Konopljova el Leningrad.

31. VII: Letero de la portugala esperantisto Kosme Rosina.



VERBAJ STELETOJ

Ljudmila Jevsejeva

ENIGMOJ

1

Kio ĝi estas,
amik' Anastaso:
du fratoj-ĝemeloj
sidrajdas sur nazo.

(okultito)

2

Kunfrapante la flugilojn
brue saltas sur barilon
vekhoroĝ', ĉe ava domo.
Kio estas ĝia nomo?

(okoko)

3

Plektante reton en angul',
ĝi ŝvitas kaj baraktas,
sed fiŝojn — je honora vort' —
per reto ĝi ne kaptas.

(araneo)

DIVENU!

Ronda, flava,
sed ne varma,
sur la kampo
kreskas sun'.

Kio estas ĝi?

Divenu!

Eble diros vi, Gudrun?

Lasu min pripensi, Franto...

Ha, ĝi estas
helianto!

GRAVA! URĜA!

Junaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto! Partoprenu amase ekspozicion de inranpenetraĵoj lige kun la Tago de la Soveta Armeo (23 de februaro) kaj la Internacia Tago de la Virino (8 de marto). Pentraĵojn sendu je adreso:

USSR, Kievo 252 157, ul. Potapov 12, ŝkola 197, Esperanto-rondo ĉe la Klubo de Internacia Amikeco „Plannedo de Amikeco“.

VORTENIGMO

de Flort Nikolov

HORIZONTALA: 1. Signalo pri ŝippereo. 3. Infaneto (radiko). 6. Spirebla daso ĉirkaŭanta la teron (radiko). 8. Aerforma substanco (radiko). 10. Komencititeroj de la titolo de Zamenhof-versa ĵo. 11. Prepozicio. 13. La inicialoj de la prezidanto de UEA. 14. La kriento de Sovetunio. 15. La nomo de la kana ŝipeto de Thor Heyerdahl. 17. Prefikso. 18. Prepozicio de loko. 19. Ingvo internacia. 22. Parto de la homa korpo. 23. La komencititeroj de bulgara E-organo ĵo.

VERTIKALE: 1. Numeralo. 2. Metallo, uzata en juvelararto. 4. Sufikso. 5. La nomo de germana klasika komponisto. 6. Maldolĉo. 7. Monunujo en najbara lando. 9. Memlumanta ĉiela astro. 11. Ĉiu el la idoj naskitaj ĉe sama akuŝo. 12. Parto de la vorto (radiko). 16. Teksaĵo el lino aŭ kanabo (radiko). 18. Sufikso. 20. Prepozicio signifanta disdividon. 21. Adverbo, per kiu oni rifuzas.

	1'S	2'O	S	X	3'B	4'E	5'B	
6'A	E	R	X	7'D	X	8'G	A	9'S
10'M	P	X	11'G	I	12'S	X	13'H	T
A	X	14'L	E	N	I	N	X	E
15'R	16'A	X	17'M	A	L	X	18'E	L
19'E	S	20'P	E	R	A	21'N	T	O
	22'K	O	L	X	23'B	E	A	

En la sekvaĵaj numeroj ni aperigos la nomojn de tiuj, kiuj korekte solvos la enigmon, kaj la solvon mem. Inter la sukcesintoj ni lotumos premie E-librojn.

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto: Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

INTERNACIAJ KURSOJ KAJ PEDAGOGIA SEMINARIO POR PRE- PARADO DE INSTRUISTOJ KAJ KURSGVIDANTOJ

5 — 24 de aŭgusto 1976 — Burgas

SUB LA AŬSPICIO DE LA INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ
INSTRUISTOJ (ILEI)

I. INTERNACIAJ KURSOJ POR ESPERANTO-INSTRUISTOJ

A. KURSOJ POR LERNADO DE LA LINGVO:

Por bulgaroj: I grado — elementa, II grado — daŭriga, III grado — supera
Por eksterlandanoj: nur II kaj III gradoj

B. KURSO POR INSTRURAJTO DE ESPERANTO

Por bulgaroj kaj eksterlandanoj, kiuj deziras diplomiĝi.

II. INTERNACIA PEDAGOGIA SEMINARIO

Por plialtigi kaj refreŝigi la lingvokononjn de jam diplomitaj E-instruistoj kaj kursgvidantoj.

En ĉiuj gradoj de la kursoj kaj en la seminario estas akceptataj **nur profesiaj instruistoj kaj gvidantoj de civitanaj E-kursoj** (neprofesiaj E-instruantoj). La akcepto en la diversaj gradoj estas farata surbaze de dokumento pri ekzameno por la antaŭa grado aŭ, se tia dokumento mankas, post ekzameno.

Ĉiutage estas 4 lernohoroj; la ceteran tempon oni uzas laŭplaĉe (sur la plaĝo, en promenadoj, ekskursoj k. a.)

Limtempo de aliĝo: por bulgaroj — la 30 de majo: por eksterlandanoj — la 15 de majo 1976.

Kotizoj: por bulgaroj — 70 lv., por eksterlandanoj — 110 bulgaraj levoj aŭ egalvaloro (inkluzivas nutradon, loĝejon, instruadon).

Sumojn oni sendu al adresoj:

a) Bulgaroj — ДСК Благоевски район, сметка 185/2553 на Софийския окръжен есперантски комитет, бул. Хр. Ботев 97, 1303 София.

b) Eksterlandanoj: ĉrez Bălgarska Vănsnotârgovska Banka do DS Kasa Blagoevski Rajon, сметка 185/2553 на Sofijskia Okrâjen Esperantski Komitet. Ĉe nebla transpago kotizoj estos akceptataj ĉe la alveno en Burgas, sed nepre per anticipa averto.

En la komuna loĝejo oni ne rajtas havi kun si infanojn aŭ aliajn nekursanojn.

La tempo, kiun la bulgaraj instruistoj pasigas en la kursoj, estas konsiderata kiel ofica laŭ letero IV-YM-2432 de la 1 de julio 1972 de la Ministerio de Popola Instruado.

Pli detalajn informojn oni povas ricevi de: Okrâjen Esperantski komitet, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario (tel. 31-00-29).

Venu perfektigi en Esperanto meze de agrabla internacia Esperanto-medio! Venu ĝui la varman bulgaran sunon kaj la ĉarmon de la Nigra Maro!

Ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ — Sofia (10. VI): informo pri la E-renkontiĝo en Razgrad lige kun la Internacia Jaro de la Virino.

En la sama ĵurnalo:

25. VII: informo pri la forveturo de la bulgara delegitaro al UK de Esperanto en Kopenhago.

22. VIII: „Internaciaj Kursoj de Esperanto“ — informo de Bulgara Telegrafa Agentejo pri la Internaciaj E-Kursoj por Instruistoj en Burgas.

25. VIII: artikolo „Insulo Esperanto“ — pri la insuleto en Danubo apud u. Orjaĥovo.

5. IX: „Jubilea E-Kongreso“ — artikolo de

N. Aleksiev pri UK de Esperanto en Kopenhago.

12. XII: ampleksa artikolo de N. Aleksiev pri la Esperanta libro sub titolo „Utila propagando de la bulgara kulturo“.

Ĵ. „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv (10. VII): informo pri la Internacia E-Seminario en Karlovo pri Ivan Vazov.

Ĵ. „Trojanski Glas“ — u. Trojan (11. VI): „E-renkontiĝo“ — informo de M. Kisjov.

Ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ 9. XII: Informo „Oni disvastigas la Esperantan gazeton“ de Ilia Ivanov.